

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

Jen n-ro 300!

Vi nun enmanigas la 300-an numeron de “Novaĵoj Tamtamas”. La origino de aparta esperantlingva paĝo ene de la organo “La Tamtamo” fontas el la ideo de bedaŭrata s-ano Ono Takao, de 1985. Ĝi celis utiligon de Esperanto por informi novaĵojn precipe el Jokohamo. Kiel organo sendebla eksterlanden, “Novaĵoj Tamtamas” renaskiĝis en 1989, kiel aparte numerita kajero.

Post n-ro 286 en oktobro 2013, ni publikigas tiun ĉi jubilean numeron per kolora presado.

Fariĝi NPO, nova defio en 2015!

Ni nun preparas reformi nian rondon kiel juran personon, Ne-Profitocela Organizo Esperanto Jokohama, espereble de la venonta aprilo, kiam ni ricevos sankcion de la urba aŭtoritato. La esenco de nia rondo kaj agadlinioj principe ne ŝanĝiĝos, sed ni havos novan respondecon al la civitanoj, ke per Esperanto ni servos al la bono de la popolo.

La Jar-kajero de Jokohama Esperanto-Rondo

De oktobro 2013 - ĝis decembro 2014

Nia rondo, kun pluraj lernoklasoj, havas preskaŭ ĉiumonate “Hama-Rondan Vesperon” (HRV), en kiu oni aŭskultas prelegon de membroj aŭ gastoj. Ni listigas HRV kaj kelkajn aliajn eventojn. Antaŭe en n-ro 286 (oktobro 2013), ni publikigis la gazeton en kolora presado, do ties daŭrigon ni metis ĉi tie.

(Sibayama Zyun’iti, la Redaktanto)

(Mallongigo por la kunvenejoj)

[KK]: nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa] en Jokohamo.

[PL]: nia vica kunvenejo, nome Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco [Kanagawa Earth Plaza]

(En 2013)

*okt. 19, 20 [Parko Zoo-no-Hana] Esperanto

ekspoziciata, en Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2013. Precipe vizitis nin s-ino Mehrangez el Taĝikistano, kaj poste ŝi aperis en regulaj kunsidoj.



- Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti, Noriko
- Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
- Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>
- Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

***nov. 2** [KK] Hama-Ronda Vespero: s-ro Fuse Kentarou parolis pri “La movado de volontuloj por ekscii pri aktivaj faŭltoj”, nome pri geologia situacio de tiu ĉi regiono kaj kiel fakuloj pritraktas pri tio.

***dec. 14** [Urbo Kawasaki] la 43-a Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagaŭa (de la 4 rondoj, nome de Jokohamo, Kaŭasaki, Fŭĵisaŭa kaj Odaŭara).

(En 2014)

***jan. 26** [PL] Jarkunveno de la rondo por buĝeto, planado, estraro ktp. Ĉeestis 20 personoj kaj estis 20 mandatoj. Kiel nova prezidanto enoficiĝis (s-ro) Sibayama Zyun’iti.

***feb. 9** [Ĉambro en la domo de JICA] Kadre de Jokohama Internacia Forumo, nia rondo havis prelegon de Sibayama Zyun’iti pri “Kunvivado de multaj kulturoj kaj Esperanto”.



***feb. 22** [KK] Hama-Ronda Vespero: spektis la filmon “Giganta Araneo”.

***mar. 1** [KK] La 94-a Legokunsido, pri la poemaro “Poemoj de Armand Su”.

***mar. 8, 9** [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj

***mar. 15** [KK] Hama-Ronda Vespero: pri Argentino, la lando de UK, kelke da membroj montris kion ili esploris.

***apr. 19** [KK] Rudimenta kurso por 12 semajnoj komenciĝis kun 5 kursanoj.

***apr. 19** [KK] Hama-Ronda Vespero: (1) s-ino Motojoŝi Akiko prezentis facilajn dialogojn en la hispana lingvo. (2) s-ino Doi Ĉieko parolis pri Esperanto en Afriko.

***maj. 17** [KK] Hama-Ronda Vespero: pri Bolonjo en Italio, en kiu kreskis s-ro Glauco Pompilio, de li mem.

***jun. 8** [KK] La 95-a legokunsido, pri la bildolibro “Rakonto de ovoj”.

***jun. 21** [KK] Hama-Ronda Vespero: s-ro Nanba Humiharu parolis pri interreto, ĝenerale kaj pri la retejo de nia rondo (alirebla per: <http://hamarondo.jimdo.com/>)



***jul. 26** [KK] Parol-kurso de s-ro Wajik (por tiuj, kiuj ne partoprenis la UK-n)

***sept. 1 ĝis 3** [KK] Ekspozicio de fotoj kaj libroj pri Esperanto



***sept. 6** [PL] Prezento de someraj spertoj, de 6 rondanoj

***sept. 13** [KK] La 96-a Legokunsido, pri la novelaro “Krokize de mia ĝardeno”.

***okt. 11 ĝis 13** [Urbo Obama] Okaze de la 101-a Japana Esperanto-Kongreso, nia rondo havis standon.

***okt. 18, 19** [Parko Zoo-no-hana] En la Internacia Festeno de Jokohamo, nia rondo havis ekspozician tendon.

***nov. 15** [KK] Hama-Ronda Vespero, pri s-ro Jui Ĉuonoŝin, oferinta sian vivon en 1967, proteste al la tiama japana ĉefministro. S-ino Aihara

Misako kaj s-ro Doi Hirokaz parolis pri li.

*nov. 22 [Tombejo Kamakura-Reien] Vizito al la tombo de Jui Ĉuunoŝin

*dec. 13 [KK] La 97-a Legokunsido, pri esearo "Pri homoj kaj verkoj"

*dec. 14 [PL] La Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagaŭa, gastigata de nia rondo, kaj gastis aliaj rondoj en la gubernio. Legu aliloke.

*dec. 20 [Ĉinstila restoracio Fukujooken] Jarfina Festeno.



Jarfina Festeno

foto liverita de s-ro Fuse Kentarou

2015 estas la jaro de ŝafo laŭ orienta kalendaro.

Feliĉan Novjaron!



NIAJ PLANOJ

*jan. 25 [PL] Ĝenerala jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo.

Oni resumos la agadojn de 2014, kaj fiksis planon de 2015. Sed ĉi-jare estas speciala situacio. Nome nia rondo esperas fariĝi jura persono de la tipo Ne-Profitocela Organizo en aprilo. Preskaŭ ĉiuj ĝisnunaj agadoj estos daŭre farotaj, sed oficiale la rondo dissolvigos, kaj la bonhavo de la rondo estos oferita al la nova NPO. La membreco de la rondanoj restos sama.

*feb. 21 [KK] Hama-Ronda Vespero, pri la 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio.

*mar. 7 ĝis 9 [KK] Ekspozicio ĉe Foiro de civitanaj agadoj

Niaj Klasoj kaj Kursoj

En [KK] okazas jenaj klasoj.

*Regulaj Klasoj en sabato: (1) Meza klaso gvidata de Doi Ĉieko; oni lernas per "Mirindaj Aventuroj de Metilernanto Hlapiĉ". / (2) Klaso por legado de "Hispana, Kataluna, Mangada..." gvidata de Doi Hirokaz. / (3) Jokohama Salono; oni legas "Vizaĝoj", tradukas kaj vendas laŭplaĉe. / (4) Daŭriga kurso, gvidata de Fuse Kentarou.

*Regulaj Klasoj en merkredo: (1) Oni legas "Kie boacoj vagadas" de Eija Salovaara. / (2) Daŭriga kurso, per la posta parto de "Hanako lernas Esperanton".

LA ZAMENHOF-FESTO DE GUBERNIO KANAGAŬA

En dec. 14, entute 45 personoj ĉeestis en la aŭdovida halo de Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco [Kanagawa Earth Plaza].

De 13:00, la 4 grupoj en la gubernio prezentis sin, nome, Jokohama, Kaŭasaki, Fŭjisaŭa kaj Odaŭara. S-ino Kitagawa Ikuko (el Kaŭasaki) bilde prezentis sian vojaĝon al la 99-a Universala Kongreso en Argentino, kaj sekvis bilda prezento de la venonta 100-a Kongreso en Francio, liverita de la LKK de la kongreso. Post prezento de Esperantaj libroj estis paŭzo.

De 15:10 por 55 minutoj estis la horo por rakonti la vivon de blinda rusa esperantisto-poeto Vasilij Eroŝenko kun deklamo de liaj

verkoj. La deklamaĵon vi trovas en la antaŭa decembra numero de tiu ĉi gazeto. Sekvis kantoj de la grupo, gvidita de s-ro Makino Micuo. En la fino, la verda standardo estis transmanigita al la membroj de Fŭjisaŭa, kiu prizorgos la Zamenhof-Feston en 2015.

La Feston ĉeestis s-ro Lim Cheak, malajzia-devena esperantisto loĝanta en Japanio. Oni unue aranĝis, ke paralele kun la Eroŝenko-programo, alia grupo ĝuos Esperantan konversacion kun li en alia ĉambro. Sed fine estis decidite, ke ĉiuj aŭskultos Eroŝenko-aĵon. Do, post la fermo (je 17:00), volontuloj kun li babilis Esperante en proksima kafejo.



97a Legokunsido

En la 13-a de decembro okazis legokunsido kun 5 personoj. La titolo de la legita libro estas "Pri homoj kaj verkoj".

Pri homoj kaj verkoj

Mizro IWAYA

Tiu ĉi libro estas kolekto de 11 eseoj kiuj ricevis bonan prijuĝon en la belarta konkurso de UEA. La enhavoj estas variaj, sed ĉiuj temas pri literaturo. Interalie komencaj du verkoj precipe tiris mian atenton.

1. Eva Tofalvy, Rolo de la persona faktoro en la Esperanta literaturo:

T.n. budapeŝta skolo montris rimarkindan aktivecon en la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj. Same hungara aŭtoro analizis ĝian detalon ĉefe el la vidpunkto de la personeco pri la aktivuloj kiel Baghy, Kalocsay, Tarcony, k.a. Ilia komuna karaktero estas malriĉeco kompare kun iliaj ne-esperantistaj kolegoj. La aŭtoro montris konkretan elmontraĵon de la malriĉeco. Tio estis nova eltrovo al mi. Tion kaŭzis la malvasteco



de Esperantujo. La maksimuma honorario, kiun la verkistoj ricevis, estis 1000 dolaroj por unu libro, t.e. po unu dolaro por 1000 ekzempleroj. Iliaj loĝdomoj estis malvastaj. Samtempe la malvasta Esperantujo kaŭzis izolitecon al ili. Bedaŭrinda fakto longedaŭra.

2. Lena Karpunina, Ni ne entombigu niajn literaturajn trezorojn:

Simila tendenco estiĝas en esperanta literaturo ke la eldonitaj libroj tuj elĉerpiĝas kaj refoje ne aperas plu. Tio estas preterlasebla se temas pri malaltvaloraj verkoj. Sed la bedaŭrinda fakto estas ke ankaŭ valoraj verkoj havas saman sorton kiel ekzemple Jean Forge, Jean Ribillard... La aŭtoro montris kelkajn rimedojn kontraŭ tia tendenco. Lastatempe okulfrappe disvolviĝis informatika teknologio. Do la aŭtoro, ankaŭ mi, opinias ke oni devas eldoni laŭbezone per interreto, k.a.

Ĉiukaze, la alia bedaŭrindaĵo estas ke ŝi mortis en la lasta jaro. Ni povus atendi pluan verkon de ŝi!

Tiuj du verkoj jam sufiĉe rekompencas la spezon de la libro.

Impreso pri la libro “Pri Homoj kaj Verkoj” eldonita de UEA en 2012

Aida Yayoi

La subtitolo de ĉi tiu libro estas: *Eseoj pri la Esperanto-kulturo*. Ĉiuj 11 eseoj en la libro estas premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA en la periodo 1981-2009. Pri la aŭtoroj mi preskaŭ ne konas escepte de la du: Lena Karpunina pro ŝiaj verkoj, “La Bato” kaj “Neokazinta Amo”, kaj Sten Johansson ĉefe pro liaj krimromanetoj kaj recenzoj. Sen la kono pri la originaloj legi nur literatur-kritikojn estas

strange kaj malsaĝe, sed tio ne estas senutila, ĉar superaj kritikoj instigas legi la originalon pro ĝia interesa, diversmaniera prezentado. Estas tie unika vidpunkto, detala analizo de la temo kaj intrigo, stilo kaj lingvo. Bonkvalitaj kritikoj estas motoroj plimultiigi legantaron, sed samtempe, for de la propagando, ili havas sian propran altiron kaj signifon kiel legaĵo sendependa de la originaloj. Se oni sentos iun kritikon interesa, ĝi jam estos survoje al sukceso. Eĉ la originala verkisto, danke al kritiko, povus renkonti nerimarkitan ĝis tiam kaj profundigi sian verkon.

En la enhavo de ĉi tiu libro la plej interesa por mi estis “Bohemia amoro: Karolo Piĉ kaj Eli Urbanová” verkita de Sten Johansson. Mi neniam legis la librojn “La litomiŝla tombejo” nek “Hetajro dancas”. Johansson tamen vekis en mi fortan intereson ekde la unua parto de la enkonduko: ĉu estas nura koincido, ke la du plej elstaraj amoraj romanoj de la Esperanta literaturo fontas el du urbetoj en orienta Bohemio?... Tiel lia kompara studo disvolviĝas, unue pri ĉiu respektiva vivhistorio, kiu havis gravan influon sur temo kaj lingvo en sia posta verkado. Piĉ “temas pri homo tre soleca kaj stampita de malfavoraj spertoj... pri liaj seksaj revoj kaj spertoj – aŭ eble nur fantazioj.” Eli Urbanová “intense korespondis kun Julio Baghy”, kaj ŝajne aperis surbaze de la “senespera amsoifo, obsedita de emo alkroĉiĝi al famuloj...” la romano “Hetajro dancas”, kiu “vekis grandan atenton pro sia malpruda enhavo...”

La resumo kaj citaĵoj el la originaloj estis interesaj. Mi ĝuis ilin kun respekto al lia detala studo, sed ankaŭ renkontis malfacilan parton diversloke. Precipe lingva analizo estis malfacila. “Piĉ havas relative simplan strukturon... kaj facile legebla...” dum la lingvaĵo de Urbanová estas “vigla, elipsoriĉa, neformala... kaprica.” Tion mi povis facile sekvi, sed aliloke malfacilaj esprimoj atendis min kiel ekz. “fikcia fikcieto, metaromano...” Kiel supre


skribite, literatur-kritikoj donas sendependan altiron, sed mi iom dubas ĉu oni vere povas kompreni aŭ refuti la kritikon ne sciante la originalon. Verŝajne mi devos legi la originalojn unue, kaj poste reveni ĉi tien por interkomuniki kun Sten Johansson.

Mi trovis hazardan koincidon kun la plej lasta paragrafo de Sten Johansson kaj ridaĉis. Li diris, ke “Jen eble la plej grava konkludo de ĉi tiu kompara eseo: ambaŭ verkoj vivas per propra unika forto kaj tute ne bezonas nian komparon.”

Sekvos aliaj impresoj en la venonta numero.

VASILIJ EROŜENKO – JAPANA POETO (3)

Tatyana Auderskaya (Ukrainio), verkita en 2012



Eroŝenko pentrita de Nakamura Cune

Sed pri kio ni temas? Kiam la rakonto pri blinda idealisto transformiĝis en aventuran romanon, en detektivan historion, en fantaston, fin-fine – kiam temas pri ekposedo de la plej raraj kaj ekzotikaj lingvoj dum kelkaj

monatoj. Ĉu ĉio tio estas vero??!

Sed ĝuste tia estas vivo de la homo, en kies animo flagras flamo. “Ekbruligis mi flamon en kor’”, - skribis Vasilij Eroŝenko. Kaj se tiu flamo estas amo al homoj, do nenio povas estingi ĝin. Hom-amo donas forton kaj ĝojon de la vivo. En la plej mornaj momentoj de soleco kaj malespero, homoj venas helpe al homo, se en lia animo flagras tiu flamo kaj varmigas ilin.

Bedaŭrinde, tro multe da tiaj momentoj travivis Eroŝenko. Personoj, nekapablaj al hom-amo, ofte strebas reciproki ĝin per malamo, kvazaŭ venĝante al alte dotita homo pro sia nesufiĉeco.

Aparte malfacile vivis Eroŝenko en Ĉinio. Tiuj 3 jaroj (1921-1923) estis unuj el la plej malfeliĉaj en lia vivo.

Sed tio okazos iom poste, kaj dume Vasilij Eroŝenko el Ŝanhajo revenis al sia amata Japanio. Tie, tiu “rusa vagabondo, saturita de nihilisma spirito, kun senbrida karaktero”, kiel priskribis lin iu japana funkciulo, verkis fabelojn en la japana kaj Esperanto. Fama japana pentristo **Nakamura Cune**^(*) ekvolis pentri lian portreton. Tiun portreton oni opinias

la plej bona olepentraĵo, kreita de japano en eŭropeca stilo. Eroŝenko diris pri tiu portreto: “Mi fordonus unu jaron de mia vivo por la ebleco ekvidi ĝin, almenaŭ unufoje”.

Eroŝenko arde strebis al sia Patrujo. Kaj en Japanio li ripetis tion, kio alportis al li sukceson en Hindio: li elpaŝis en socialistaj mitingoj, partoprenis festadon de la Unua de Majo. Trista, alta kaj maldika, Vasilij Eroŝenko laŭ multo similis al la Kavaliro de Trista Imago. Sed ĝuste pri tiaj, kiaj li, diris rusa verkisto **I. S. Turgenev**^(*): “Se malaperos Don-Kiĥotoj – fermu la Libron de l’ Historio! Oni ne havos pri kio skribi en ĝi!” Socialismo estis por Eroŝenko mirakla “Lando de Ĉielarko”, kie ne ekzistas malriĉuloj, kie ĉiuj infanoj manĝas ĝissate kaj loĝas en sekaj, varmaj domoj. Nun, post preskaŭ jarcento, ĉe ni estas neniigita socialismo kaj denove aperis malriĉaj, malsataj kaj senhejmaj infanoj. La homaro ekstermas kaj Don-Kiĥotojn, kaj iliajn revojn. “Sed kie ajn mi estu, - skribis Eroŝenko, - mia hom-amo, mia kompato al suferantaj kaj humiligitaj, - ĉio tio por ĉiam restos en mia koro”.

Printempe de 1921 Vasilij Eroŝenko estis arestita, batita kaj elsendita el Japanio. Policianoj perforte malfermadis liajn palpebrojn por kontroli, ĉu li vere estas blinda.

Pro la civila milito li ne sukcesis penetri en Rusion, kaj iutage en julio li, ĉifonvestita kaj sen aĵoj, nur kun la sola gitaro, frapetis al la pordo de sia japana amiko, loĝanta en **Harbino**^(*) (Ĉinio). En ukrainia klubo de la urbo Harbino, Ero-san (tiel nomis lin japanoj) deklamis sian fabelon “La lando de Ĉielarko”. Sed, kontraste de Japanio, en Ĉinio li ĉie, inter samideanoj kaj inter fremduloj, renkontis nur indiferenton kaj nekomprenon.

(daŭrigota)

(*1) 中村彝、Cetere, samtempe lin pentris Curuta Goroo (鶴田吾郎) (*2) ツルゲーネフ (*3) ハルビン

BILDOESEJO

Luksa ŝipo-vojaĝo al Ogasawara

NANBA Humiharu

Je la lasta julio, mi vojaĝis al insulo Ĉiĉi-ĵima en la insularo Ogasavara. Ogasavaroj situas ĉirkaŭ 1000 km sude de Jokohamo. Du tagojn de la ekvojaĝo el la haveno Kobe, la ŝipo atingis la insulon Ĉiĉi-ĵima.




ASUKA II : La plej granda krozoŝipo en Japanio. Jokohamo estas la hejma haveno de tiu ŝipo. (Tamen, ĉi tiun foton mi fotis ĉe la haveno Kobe...)



ASUKA II estas tre luksa krozoŝipo! Kompreneble en la ŝipo estas naĝejo.



Kvankam la tagoj estis dum *cuju* (pluva sezono en Japanio), la malproksima insulo ne rilatas, ĉar la insulo situas en subtropika zono. Vetero estis tre bona! Tamen, estis tro varmege kaj humide...



Vespere, la ŝipo ekiris de Ĉiĉi-ĵima por reveni al Kobe. Kelkaj boatoj kunveturante adiaŭis nin!

Promeni en la Arbara Muzeo de Skulptaĵoj en Hakone

TANIGAWA Hiroshi



Familio
de Henry Moore, franco

La 29an de majo mi kaj mia edzino vizitis la Arbaran Muzeon de Skulptaĵoj en Hakone. Promenante en la parkostila, liberaera muzeo ni spektis kaj ĝuis multajn, diversajn skulptaĵojn. Diverformaj statuoj estis dislokitaj en verdaj gazonoj, sub aŭ inter arboj. La skulptaĵoj kreitaj de virtuozaĵoj estas per si mem superbe allogaj sen diri pri la lokiteco. Sed al mi ŝajnas, ke la bonkvalitaj skulptaĵoj estas pleje efike montras sian esencon, kiam ili estas lokitaj subaere.

Henry Moore diris; “Kiel la fono de la skulptaĵoj nenio estas pli taŭga ol aero. La firmaj formoj montras akran kontraston kun la senforma liberaero.” Henry Moore estas unu el la plej konataj kaj ŝatataj ankaŭ de japanoj. Ankaŭ en Jokohamo, en la Strato Oodoori-Koen, ni vidas lian skulptaĵon.

La kompleto de la grandaj kvar statuoj de Antoine Bourdelle impone starantaj en la fono de la aero ŝajnas al mi kvazaŭ la simbolo de ĉi tiu Liberaera Muzeo. Ni vidas en Jokohamo (en la surtegmenta parketo de Ĵojnas) lian skulptaĵon ; “**La Frukto**”.



de maldekstre ; “**La Libereco**”, “**La Venko**”
“**La Forto**”, “**La Elokvento**” de Antoine Bourdelle
Oni komentariis, ke la kvar statuoj estas instalitaj kiel la gardantoj de la tombo de Generalo Belgrano, heroo de la naciliberiga milito de Argentino.



La paŝanta Van Gogh
de Ossip Zadkine, ruso

**Redaktanto
salutas**



Dankon al la antaŭuloj por ke ni nun havas la 300-an numeron! Ni ŝatus ricevi viajn gratulajn kaj/aŭ kritikajn vortojn.